




# BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO

AÑO XXII - Nº 261

ENERO-FEBRERO 1984



Kordovo, urbo kie ĉi-jare okazos la 8-a H.E.J.S-Tendaro

## BOLETIN DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Directora: María Aurora Viloria

DIRECCION Y ADMINISTRACION

Apartado 119 - VALLADOLID

REDACTOR JEFE

Salvador Aragay Galbany

Bassegoda, 40

Tfno: (93) 3338081

BARCELONA-28

COMITE DE REDACCION

Giordano Moya

Vicente Hernández Llusera

Gabriel Mora i Arana

Andrés Martín González

Luis Serrano Pérez

Miguel Gutiérrez Adúriz

### ENHAVO

	Pagó
Invito	3
lom pri Seviljo	4
Antaŭkongresa Saluto	5
La Esperantista Kongreso de Andaluzio	6
19-a Kataluna Kongreso de Esperanto	8
Paco	10
La evoluo de inseksaj finaĵoj	12
Rekomendoj al la kunlaborantoj	14
Notas de intereso para todos los federados	15
Fundación Esperanto	16
Internaciaj Kongresoj kaj Kunvenoj	17
Niaj Grupoj	18
Hispana Liriko	19
Informo	20
44-a Hispana E-Kongreso	20
Recenzoj, Recenzoj, Recenzoj	21
Deziraro Korespondi	23
Provizora Programo de la H.E. Kongreso	24
8-a H.E.J.S.-Tendaro	24

## UTILAJ ADRESOJ

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Apartado 119

VALLADOLID

**Prezidantino**

María Rafaela Uruña Álvarez

Avda. Ramón y Cajal, 12, 2º C

Tfno. (983) 260086

VALLADOLID-11

**Sekretario**

Luis Hernández García

Adreso kiel supre

**Kasistino**

Carmen Conde Labajo

Calixto Valverde, 8, 8º A

VALLADOLID-14

Pagojn sendu al nia Konto

Nº 001.664-0

Caja de Ahorros Popular

Ag. Urbana 6

Avda. Vicente Mortes

VALLADOLID

**Libroservanto de H. E. F.**

José González Suárez

Apartado 119

VALLADOLID

Pagoj por libro-servo sendu al unu el la jenaj kontoj:

Cuenta Postal 3.118.078

Caja de Ahorros Popular

Oficina Central

Cta. Nº 042.268-4 a nombre de

LIBRO-SERVO DE LA FEDERACION

ESPAÑOLA DE ESPERANTO

VALLADOLID

**ELDONA FAKO**

Inés Gastón

Pº de la Constitución, 35, 4º

ZARAGOZA-1

**ĈEFDELEGITO DE U. E. A.**

Juan Azcuénaga Vierna

Gral. Dávila, 127, portal 7, 2º Iz.

Tfno: (942) 339487

C. Postal: 03548531

SANTANDER

H. E. J. S.

Atocha, 98, 4º

Tfno: (91) 2308798

MADRID-12

---

# INVITO

Nova Hispana Esperanto-Kongreso alproksimiĝas kaj, kiel kutime, mi deziras inviti vin partopreni, unu plian fojon, en tiu tutlanda esperantista aranĝo.

Por tiuj kiuj jam partoprenis aliajn antaŭajn Kongresojn, estas facile supozi ke la okazigo de kongreso en **Seviljo** signifos okazon kontakti kun aliaj esperantistoj, interŝanĝi vidpunktojn, partopreni pli aŭ malpli aktive en Seminarioj, kunvenoj, k.t.p. kaj scii pri la nuna momento de la Movado en nia Lando.

Por tiuj, kiuj izole studis Esperanton, aŭ unuafoje ĉeestas Kongreson, la partopreno en ĝi povas esti tute malsimila, kaj mi opinias ke dependas de ni ĉiuj, nenovaj esperantistoj, la impresoj kiun tiuj novaj samideanoj havos je la fino.

Kongreso por ni devas signifi unuecon, fratecon kaj por tiu celo niaj streboj devas intenci interparoli kun la unuafoje partoprenantaj samideanoj, paroli ĉiam en Esperanto por praktiki kaj por krei nian propran esperantistan etoson, labori kune junaj kaj nejunaj samideanoj, ĉiu en sia propra tasko kaj laŭ sia sperto sed kun la sama deziro: sukcesigi la jaran kongreson.

La membroj de L.K.K. kaj seviljaj samideanoj de antaŭ monatoj laboras por tiu celo. Ni ankaŭ povas helpi ilin, aliĝante frue, kaj se ni deziras partopreni aktive en la Seminarioj, anoncante la temon de nia partopreno.

Seviljo estas juvelo de nia Lando kiu meritas viziton, kaj indas kapti la okazon por koni la andaluzan tradicion, historion kaj aspirojn de tiu popolo.

Mi kore invitas vin ĉiujn profiti de tia ebleco.

Korajn salutojn.

*D-rino Maria Rafaela Urueña*  
(Prezidantino de Hispana Esperanto-Federacio)

# IOM PRI SEVILJO



Tipa sevilja angulo

La celo de ĉi tiu artikolo ne estas enuigi vin per listo de belaj monumentoj vizitindaj, per rakonto de tipaĵoj, per la ĉiama diraĵo: la ĉi-jara kongresurbo estas tre bela. Ni volas montri al vi novan, modernan Sevilon, urbon de kongresoj.

«La Giralda», la Katedralo, la Alkazaroj, sendube estas tre vidindaj kaj artaj, sed ankaŭ, ili povas rezulti

tedegaj por la vizitantoj, kiuj, kiam venas Sevilon, nur aŭdas flatajn vortojn pri la sama afero. Estas nia laboro ne lacigi niajn vizitantojn per frazoj kiel «Seviljo estas unika», «Seviljo estas malsama», k.t.p., ĉar, kvankam la ŝovinismoj inventis la francojn, ĝi estas tro uzata en la sudaj lokoj.

Per tio, ni ne volas diri al vi, ke kiam vi venos Sevilon, vi ne vidos eĉ unu monumenton, aŭ ne eniros en tipejon. Tutmale; ni volas, ke, kiam vi foriros el Sevilo, vi ne nur rememoru «La Giralda»-n, la katedralon, k.t.p., sed ankaŭ kunportu ion el la esenco de nia urbo, vi ne devas kontentiĝi per la kunporto en via menso de nura ekstera parto de urbo, kiun vi vizitas.

Feliĉe, la malhelaj tempoj finiĝis (aŭ volas finiĝi), kaj nia urbo volas ŝanĝiĝi. Sevilo ne plu volas esti la urbo de la esenca tipismo antaŭ ĉio, la urbo de la gitaro, de la kanto kaj de la vino. Ni ne devas tute rezigni tion, sed tio ne plu povas estis nia tuta kaj plena difino. Sevilo volas modernigi kaj aspekti urbo el la fino de la dudeka jarcento, kvankam ankoraŭ iuj celas malebligi tion.

Do, kongresano, kiam vi venos Sevilon, forlasu la antaŭjuĝojn, kiuj ĉiam difinis nin. Forgesu tiun tipisman envolvajon, kiu estas malfeliĉe sur ni, kaj, tiel, vi troviĝos antaŭ nova urbo. Vi havos la ŝancon eltrovi Sevilon.

ALBERTO FRANCO  
LKK-ano de la 44-a Hispana  
Kongreso de Esperanto

# ANTAŬKONGRESA SALUTO

Karegaj geamikoj:

Kiel sciате, ja, la venonta Nacia Esperanta Kongreso okazos dum julio en Seviljo, kio estas vere kultura evento por la suda esperantismo kaj profitinda manifestado tiel por la andaluzoj kiel por la tutlandaj samideanoj.

Ankoraŭ ni freŝe memoras la ĝojan alvenon, la favoregan aproban sintenon, kiun la sevilja esperantistaro spertis kiam ni decidis en la Murcia Kongreso gastigi la Nacian Kongreson de la jaro 1984-a. Tio, sincere, kuraĝigis nin laboradi entuziasme kaj pli bone, kaj sur tiu vojo ni antaŭemarŝas post tiu finfina decido, jam dujara, ĝis hodiaŭ mem, kiam ni troviĝas je la peniga kaj samtempe feliĉiga aranĝado.

Historie, Seviljo estis nur unu fojo sidejo de Nacia Kongreso de la internacia lingvo, sed jam de tiam longa tempo pasis. Tio okazis ĝuste la jaron 1928-an, vere memorindan, kies altan kongresnivelon ni volus minimume atingi dum la nunjara.

Kiel ĉiam, Seviljo akceptos vin plenplene, frate, amikece. Oni devas agnoski nian senspertecon pri organizado de tiaj kulturajfojoj, sed, vere, la laborvolo kaj la fervoro povas fari miraklojn.

Tial, bonvolu fidi je ni, same kiel ni faras reciproke. Vi, vizitontoj de la Kongreso, ne estu simplaj turistoj... ne, vi estu antaŭ ĉio pliaj seviljanoj, kunloĝantoj, kunvivantoj en unu sola familio... Je nia celo, despli ambicia ju pli atinginda.

Momente, ĉi tiuj vortoj estu sufiĉaj por sciigi nian atendon kaj nian esperon al vi ĉiuj, diverslokaj samideanoj. Ni renkontiĝos certe plurfoje antaŭ julio. Kaj... dume, Seviljo jam antaŭkongrese vin salutas...

*La Prezidanto de L. K. K.  
Manuel Ramírez*

## 1-A ESPERANTISTA KONGRESO DE ANDALUZIO KORDOVO 13 A 15 A DE AGUSTO 1983

al volentis  
moderate  
no kontraŭ

erboles  
contra  
polucion  
zandalos



Grupo da gepartoprenantoj.

# La Esperantista Kongreso de Andaluzio

La pasintajn tagojn 13-an ĝis 15-an de aŭgusto 1983-a, okazis en Kordova la 1-a Esperantista Kongreso de Andaluzio. Tiu kongreso estis organizita de la andaluzaj junularo, kiuj renkontiĝis en Kordova la pasintan 10-an de aprilo. Kiel unuan kongresurbon oni nomumis Kordovon, kaj la LKK estis formita el membroj de la Grupo de Esperanto IB «Séneca». La neceso organizi tiun kongreson estis videbla post la Hispana Kongreso okazinta en Malago en 1982-a. Tie la andaluzaj gesamideanoj komencis kunlaboregi kaj kompreneble interamikigi. La du andaluzaj revuoj, t.e.: *Cenaĉero* kaj *revuo de SEJO*, daŭrigis sian gravan laboron, kaj eĉ naskiĝis alia esperantista bulteno «La Kordova Esperantisto». Kiel rezulton de la komuna laboro oni decidis, organizi kaj rekontiĝi en jara kongreso.

La 1-a Kongreso okazis en la kordova rondo «La Amistad» —La amikeco—, centjara societo kun komfortaj kaj eĉ luksaj salonoj, kie en la jaro 1925-a okazis la 5-a Hispana Esperantista Kongreso. Partoprenis en la Andaluzia E-Kongreso preskaŭ 50 geesperantistoj el Malago, Seviljo, Jaen-o, Granado, Madrido kaj Kordova. Ni ankaŭ ricevis viziton de italaj ekskursantoj kies delegito, s-ro Aldo Foa partoprenis en kelkaj kunvenoj.

La sabaton 13-an, je la 12-a horo malfermiĝis la kongreso, oni disdonis la kongresan dokumentaron kaj detalis la programojn. Poste oni traktis la fondiĝon de Andaluzia Esperanto-Federacio (AEF), kvankam la grupoj prokrastigis tiun ĉi temon ĝis la lundo. Delegitoj parolis pri la problemoj de la nunaj

andaluzaj E-grupoj, t.e. Malago, Seviljo kaj Kordovo, ĉar malgraŭ ke la andaluzaj grupoj laboras sufiĉe bone ili havas problemojn, precipe monajn. Sabate vespere, post promenado tra vidindaj lokoj de nia urbo, sufiĉe amuziĝis la gekongresanoj en tipaj trinkejoj de la juda kvartalo apud la famega Moskeo.

Dimanĉe dum la mateno la kongresanoj vizitis Moskeon kaj promenadis tra la urbo, finante en tipa vinkelo kie nuntempe kaj post la vizito aperas sur unu el la bareloj, teksto en Esperanto memoriganta ĉi-tiun kongreson. Vespere la kunsidoj daŭris: la 1-a temis pri la venonta HEJS-Tendaro kiu okazos en Kordovo dumpaske 1984-a. Oni detalis la programon kaj konstatis ke ene de ĝi okazos Jubilea Kunveno ĉar H.E.J.S. —junulara sekcio de H.E.F.— festos sian 25-an datrevenon; fina programo, loko kaj aliĝiloj estos traktitaj okaze de estonta estrarkunsido de H.E.J.S.

Oni interparolis ankaŭ pri la venonta Hispana E-Kongreso okazonta en Seviljo. La sekvanta kunsido temis pri la diversaj instrumentadoj de nia lingvo, la partoprenantaj instruistoj interŝanĝis siajn spertojn kaj parolis pri diversaj metodoj. Nokte la gekongresanoj vizitis la Alkazon, estantan vera mirindaĵo.

Lunde, matene oni detalis la venontan fondiĝon de la Andaluza Esperanto-Federacio, formiĝis komitato kiu devos prepari la statutojn, la tri andaluzaj grupoj devas unuiĝi je regiona nivelo, zorgante fondi aŭ helpi novajn grupojn, kie ili ne ekzistas. Per ĉi tiu Federacio oni povos atingi la venonta de la Andaluza Aŭtonomi-Kunveno, povanta kunlabori kun andaluza fonduso, nomita «Blas Infante» nomo de grava andaluza esperantisto.

Sed sendube unu el la plej baldaŭ videblaj rezultoj de ĉi tiu kongreso estas la proksima apero de nova revuo «Andaluzio», unue ĝi estos bulteno de la Andaluzaj E-Grupoj kaj poste organo de A.E.F. Ĉiuj andaluzaj grupoj kaj samideanoj rajtas kunlabori sed nun verkos la unuan ekzempleron la grupo Esperanto IB Séneca. La 1-a Esperantista Kongreso de Andaluzio finiĝis per la

kanto de «La Espero» kaj «La Andaluza Himno».

Pri la propagando kaj disvastigado de la 1-a Andaluza Kongreso la LKK devas aserti ke la kordovanoj kaj ceteraj andaluzoj, sufiĉe konis nian laboron. Tiel la urbodomo fiksas en videblaj lokoj de la urbo afiŝojn pri la kongreso hispanlingvaj kaj esperantaj. Ankaŭ la kordovaj ĵurnaloj kaj eĉ eksterprovinciaj parolis pri la kongreso. La sabaton 13-an aperis en la ĵurnalo «La Voz de Córdoba» intervjuo kun la prezidanto de L.K.K. s-ro José María Rodríguez. La ĵurnalo «Córdoba» informis pri la Andaluza E-movado kaj precipe pri H.E.J.S. kaj ĝia laboro, ĝia proksima tendaro en Kordovo ktp. Ankaŭ aperis informoj en la seviljaj periodaĵoj kiel «ABC», «El Correo de Andalucía», «Nueva Andalucía», kaj en la malagaj ĵurnaloj «Diario de la Costa del Sol» kaj «Sur» kaj en la ĵurnalo «Jaén».

Radie oni informis en «Radio Cadena Española» kiu intervjuis kordovajn kaj seviljajn reprezentantojn; regiona programo en «SER» kaj «Radio Nacional de España» informis pri la kongreso. Ankaŭ post la kongreso, seviljaj samideanoj informis per speciala programo en «Radio Nacional de España» dum dekkvin minutoj. Plie kiel granda kulmino, la tagon 2-an de septembro, kadre de «Radio Exterior de España» kaj en sep lingvoj oni disvastigis la konkludojn de la 1-a E.K.A. por la aŭskultantoj de Sudameriko kaj Filipinoj.

La L.K.K. deziras danki al Gimnazio «Séneca», senlaca helpanto de la E-movado en Kordovo, «Círculo de la Amistad», gravega kordova societo, urbestro kaj al nia samideano Jerónimo Muñoz, kiu helpis nin atingi la Kongresejon.

Nur restas aldoni ke tiu ĉi kongreso estis la unua grava paŝo de la andaluza samideanaro en la dua laborepoko, la unua okazis de la jaro 1910-a ĝis 1920-a.

Finfine, nome de la malaga esperantistaro ni deziras inviti ĉiujn hispanajn esperantistojn partopreni en la 2-a Andaluza Kongreso de Esperanto kiu okazos en Malago la jaron 1984-an.

La L.K.K.

# 19-a KATALUNA KONGRESO DE ESPERANTO



La Esperanto flago flirtas en la Kongresejo.

En Sabadell, de la 29-a de oktobro, ĝis la 1-a de novembro okazis la 19-a Kataluna Kongreso de Esperanto kaj en ĝia kadro, la 23-aj Internaciaj Floraj Ludoj.

La 19-a Kongreso sekvas tiun 18-an, kiu okazis en Manresa en 1936-a je la komenco de tiu somero, en kiu eksplodis nia civitana milito. Intertempe de 1957-a ĝis la nuna jaro 1983-a estiĝis 14 Barcelona-Provincaj Renkontiĝoj kaj 10 Katalunaj Esperantistaj Renkontiĝoj.

La unua Kataluna Kongreso de Esperanto okazis en la sama urbo Sabadell en 1910-a kaj ĉar la nuna kongreso en Sabadell sekvas tiun de Manresa post kvardek sep jaroj, ĝi estis eksterordinara, ĉar ĝi signifas la komenciĝon de nova epoko. Ankaŭ estas rimarkindaj la kun-

laborado de la urbaj aŭtoritatoj kaj la partopreno en la Honora Komitato, de la Prezidanto de la Kataluna Parlamento, Ministroj de la «Generalitat» kaj ĝia Prezidanto, la honorinda Jordi Pujol.

Pro la multenombraj programeroj, la Kongreso ne estas rakontebla entute, sed nur skize menciieblaj ĝiaj gravaj aranĝoj: Kvar ekspozicioj: «La internacia komunikado», «Esperanto en Katalunio», «Esperanto kaj Paco» kaj «La polaj infanoj desegnas por la paco»; la Internaciaj Floraj Ludoj; kvar laborgrupoj laboris super la konkludoj kaj rezolucio de la Kongreso; Esperanto Rendevuo en tri apartaj gradoj: por komencantoj, por perfektigo kaj pri literaturo; prelego fare de Josep Martínez de Foix, prezidanto de «Club d'Amics de la UNESCO de Katalunya» pri «Esperanto kaj Paco»; ronda tablo pri la komunikado inter la popoloj, en kiu partoprenis reprezentantoj de politikaj partioj; surplaca festivalo por la paco kun folkloro festo el popolaj katalunaj dancoj; la bankedo; la kaŝtanfesto; kaj en la dimanĉo frumatene la Meso kaj la ĉiama interesegega prediko en Esperanto fare de pastro Manuel Casanoves.

En la akceptado en la urbodomo la urbestro Antoni Ferrer, post la bonvenaj vortoj, faris paroladeton pri la karaktero de la urbo Sabadell kaj ĝia nuna problemaro kaj menciis la personecon de la estinta Jaume Viladoms kiel aktivulo kaj de Esperanto kaj de la kulturo en Sabadell. La Prezidanto de Kataluna Esperantista Asocio (KEA) Manuel Casanoves nome de la esperantistoj dankis la aŭtoritatojn de Sabadell.

La inaŭguran paroladon faris Albert Manent —Generala Direktoro de Kulturo de la Ĝeneralitat—. Poste alvenis la salutvortoj de eksterlandanoj kaj reprezentantoj. Nome de HEF salutis la Kongreson nia Prezidantino Rafaela Urueña, kiu diris, ke ŝi havis ŝuldon al la Kataluna Kongreso de Esperanto en Sabadell, ĉar ŝi ne povis ĉeesti en tiu urbo kiam en ĝi okazis la Hispana Kongreso. Ŝi deziris sukceson al la Kongreso kaj pledis por kunlaborado. «Ni kune festos la centjaran datrevenon de Esperanto».



S-ino Urueña invitis partopreni en la Hispana Esperantista Kongreso en Sevilla, okazonta en 1984-a.

- Post la salutoj, la urbestro de Sabadell per paroladeto deklaris la Kongreson malfermita.

Kiel intermezon juna paro da gekoncertistoj ludis per violono kaj gitaro muzikverkojn de «Paganini» kaj post tio alvenis la ĉefa arango de la Kongreso, «La 23-aj Internaciaj Floraj Ludoj».

Gabriel Mora i Arana, kiel Sekretario de tiu literatura konkurso, faris enkondukan paroladon pri la malvolviĝo de la Internaciaj Floraj Ludoj en Esperanto ekde la unua en 1909-a okaze de la 5-a Universala Kongreso en Barcelono ĝis tiu de la 18-a Kataluna Kongreso de Esperanto en 1936-a, kaj pri la nuntempaj sekvantaj post la Kataluna Renkontiĝo en Tortosa. Li memorigis pri niaj mortintoj dum la jara intertempo kaj legis la Verdiktan akton. La gajnintaj verkoj estis verve deklamitaj.

La hungara doktoro György Nanofszky eldiris la Festparoladon, kiu traktis pri la

tiama, intermilitaj, florado de Esperanto en Hungarujo, la nomata Budapeŝta Skolo, kaj la altkvalita revuo «Literatura Mondo».

La Arta Festivalo konsistis el teatra ludado de unuakta teatraĵo esperantigita de Ricard S. Güell: «La Spegulo de la Tempo» bonege aktore ludita de Vilanova Esperanto Arta Trupo (VEAT) kaj kanzonoj en Esperanto de la itala esperanto-kantisto Gianfranco Molle.

Je la fermo de la Kongreso parolis Llibert Puig kiu anoncis la venontan Katalunan Kongreson de Esperanto, okazontan en la urbo Olot, al kies esperantista reprezentanto li transdonis la kongresan flagon.

En tiu ferma kunsido, oni proponis voĉdoni la konkludojn de la laborkunsidoj, kiuj estis aprobitaj kiel rezolucio de la Kongreso.

Manuel Casanoves, prezidanto de KEA per emociaj vortoj fermis la Kongreson.

G. MOYA

---

## 23-aj Internaciaj Floraj Ludoj

### VERDIKTO

**ROZO kaj NATURA FLORO:** «POST AM' TIOMA JAM LA MENSO TRANSAS». Aŭtoro: Nicolino ROSSI, el Italujo.

**EGLANTERIO:** PAGANA HIMNO. Aŭtoro: GIORGIO SILFER, el Svislando.

**VIOLO:** ĈU FIERI ESTI HOMO? Aŭtoro: Jiří KOŘINEK, el Ĉeĥoslovakujo.  
**Honora Mencio:** LARMOJ. Aŭtorino: Lilija Pavlova KOLEVA, el Bulgarujo.

**PREMIO «FREDERIC PUJULÀ i VALLÈS»:** BOBI, LI KAJ ŜI...  
Aŭtorino: Rajna Angelova KONSTANTINOVA, el Bulgarujo.  
**Honora Mencio:** LA PAROJ STULTAJ. Aŭtoro: GIORGIO SILFER, el Svislando.

**PREMIO «JAUME GRAU i CASAS»:** POEMO I (el la poemaro de Ausiàs MARCH)  
Aŭtoro: Abel MONTAGUT i MASIP, el Katalunujo.

**PREMIO «ARTUR DOMÈNECH i MAS»:** Ne aljuĝita

Subskribis la Verdiktan Akton:

P. Manuel CASANOVES, Prezidanto; Jordi CARBONELL i PINYOL, Joan-Ramon GRIÑON i ROSET, Salvador GUMA; kaj Gabriel MORA i ARANA, Sekretario.

Sabadell, la 30-an de oktobro 1983-a.

---

# PACO

Sed, kio estas la paco? Por trovi respondon al ĉi tiu demando, milioj da homoj dediĉas sian vivon. La paco estas la plej subluma stadio de la homa vivo, kio evidente signifas kompletan feliĉon de la homa estaĵo. La problemo estas, ke ne ĉiuj personoj havas la saman koncepton pri la paco. Krome, la vojoj por trovi la pacon estas diversaj, kaj ĉi tiu diverseco respondas al la diversaj kriterioj de ĉiu homo. Kiam la homoj batalas por atingi pacon, fakte ili vivas malpace, tio ja estas evidenta. Kaj, kial la homo vivas malpace? La respondo estas simpla, nome ĉar ekzistas egoismo kaj avareco, kaj samtempe mankas solidareco kaj vera amo. Kiam najbaro diskutas kun alia najbaro, tio estas komenco de malpaco. Iuj opinias, ke la malpaco estas io nedisigebla de la homa karaktero. Tio ja ne estas vero. La kaŭzoj por malpaco estas preskaŭ ĉiam la frukto de la eduko ricevita kaj de la kondiĉoj sociaj, en kiuj vivas la homo. La malpaco komenĉiĝas, kiam iuj homoj deziras superregi aliajn homojn, sub la propra kriterio, ke ili estas superaj. Por efektiva paco ne estas homoj superaj, nek inteligentaj, nek analfabetaj; por efektiva paco nur estas homoj, kiuj unualoke metas la bonajn rilatojn kun siaj samspecanoj. La tasko ne estas facila, precipe en socio kun grandaj diskriminacioj. La diskriminaciatoj, do la suferantoj, tuj konceptas, ke ili ne vivas pace, ĉar senvole ili estas submetitaj de aliaj homoj. Aliflanke troviĝas la homoj, kiuj okazigas tiun diskriminacion. Por ĉi tiu grupo da homoj ja vere ekzistas paco, ĉar iliaj deziroj estas ple-

numataj, ili vivas feliĉe. Fakte, la paco estas justa kunvivado de homoj, sed ĉi tiu kunvivado estas ege malfacila, kiam ne ekzistas egalrajta distribuo de la rimedoj ekzistantaj kaj necesaj por vivi. Neniam estos paco inter plena kaj malplena stomako. Evidente ĉi tiu paco ne rilatas nur al la normala kaj ne diskutbla nutrado de la korpo. En ĉiu aspekto de la socia kunvivado povas ekzisti malpaco, se la diferencoj inter la homoj estas diskriminaciaj.

Ĉiu milito devenas de sociaj konfliktoj, kaj en tiujn sociajn konfliktojn, ni devas ankaŭ meti tiujn religiajn, kiuj siavice estas ankaŭ parto de la socia penso kaj kunvivado.

Strange estas, sed ja la historio estas rakontata aŭ instruata laŭ militoj okazintaj. Mi ankoraŭ memoras, ke dum miaj malmultaj lernejarajaroj, la instruisto por instrui al ni historion, prenis aŭ uzis kiel referencon ĉiujn pasintajn militojn. Tiu-periodo, kiam mia menso ankoraŭ ne estis konstatinta la verajn kaŭzojn de la militoj, mi akceptis tiujn lecionojn varme kaj entuziasme. Ja, ĝuste en tiu momento oni komencis prepari min por la milito. Se la valoro de la historio baziĝas sur militoj, estas evidente, ke la paco restas je la dua loko, kio fakte estas grava fiasko por la homo. Eble en la lernejo devus ekzisti aparta katedro por klarigi al la «blankaj mensoj» la valoron de la paco. Almenaŭ tiel oni komencus konstrui edukon sur pilieroj de homa kaj humaneca kunekzistado. Tamen mi multe dubas, ĉu nia socio kapablos starigi tian edukosistemon. Se por instrui la historion oni montras la militojn, kiel valorajn

heroaĵojn, estas evidente, ke ni marŝas sur malbona vojo.

Jes, estas eble vivi pace. Sed por tion atingi oni devas apliki alian filozofion pli justan por la vivo kaj la rajtoj de la homoj. Kaj mi ne ĉesos diri, ke ĉiuj militoj devenas de sociaj maljustaĵoj. Dum en nia socio daŭre ekzistos montoj kaj valoj, ĉi tiuj diferencoj de malegaleco estos fontoj de malkontenteco, kiuj pli frue aŭ malfrue finiĝos en seriozajn militajn konfliktojn. Ĉiu devas scii, ke por malsatulo, ĉu pri pano aŭ pri kulturo, neniam ekzistas paco. Li neniam vivas pace, eĉ se li estas la plej pacama homo de la mondo, ĉar lia animo vivas en la plej humiliga stadio, kvankam li neniam kapablos ribeli por atingi siajn homajn rajtojn.

Pro tiuj sociaj konfliktoj, kaj pro la apero de nova sociordo, rilate al la laboro, al la ekonomio kaj al distribuado de la nacia rento, la mondo, sed precipe nia malnova kontinento, travivas tre seriozan krizon, en kiu la paco estas en danĝero. Mi ne intencas analizi, ĉi tie, kiu pravas aŭ malpravas, tamen estas menciinda la fakto, ke la homaro troviĝas antaŭ ebla katastrofo. Pri la paco kaj la milito ni ĉiuj respondecas. Oni ne povas kritiki tiun aŭ alian nacieŝtron, ĉar vere, kiuj kulpas estas ni, ĉar ni ne kapablas defendi nian vivon.

Iom post iom la homo konscias pri la minacanta danĝero, sed ankoraŭ granda nombro, tre konsiderinda, restas tiurilate pasiva. Ĝuste estas ĉi tiuj lastaj, kiuj pro sia pasiveco glatigas la vojon al la milito. La paco koncernas al ĉiuj, ĉar hodiaŭ neniu

restas for de ĉi tiu danco de la morto. Se ni ĉiuj unuanime, ŝultron ĉe ŝuldro, energie protestus, estas nediskuteble, ke ni barus la vojon al la milito. Feliĉe ni devas konstati, ke ĉiutage pligrandiĝas la vicoj de la pacdefendantoj, sed tio ankoraŭ ne sufiĉas. En ĉi tiu porpaca batalo devas preni parton ĉiu homo, ĉar nia homa digno tion postulas. Ĉiu amanto de la vivo kaj de nia raso devas aliĝi al ĉi tiu pacista ĥoro kaj oni devas fari tion tuj, sen prokrasto, ĉar poste estos malfrue. Ni laboru por la paco ĉiumomente kaj ĉie.

Jes, estas vero, ke en ĉi tiu pacista ĥoro la tono estas en iuj okazoj tre diversa, sed vero estas ankaŭ, ke ĉiu pacisto en kiu ajn manifestacio, neniam demandas al la kuniranto, kiu vi estas? Ĉiuj estas unuigintaj pro la terura danĝero, kiu minacas ĉies ekziston: la estontecon mem de la homa raso kaj eĉ la naturon. Mi sentas min orgojla, kiam mi povas ĉeesti aranĝon, en kiu oni defendas, oni postulas pacon. Eĉ gvidantojn ne bezonas la pacistoj, kaj vi tuj komprenos, kiel agrable estas lukti por tiel digna celo. Forigu vian timemon kaj aliĝu al tiu rondo de homoj, kiuj kuraĝe batalas por ke vi daŭre povu vivi. Tiucele laboru en via medio, en via laborejo, en via amikara rondo, eĉ en via hejmo. Defendu vian vivon. Tio ja fariĝos nia plej pozitiva strebado al la paco.

Ke niaj filoj povu ĝui plej bonan kaj trankvilan vivon. Konsciu pri la temo kaj iru antaŭen, sekvu la vojon de la blanka kolombo, kaj vi sentos vin pli humana.

LUIS SERRANO PEREZ

# La evoluo de inseksaj finaĵoj kaj sufiksoj en Esperanto

Bernard Golden

Pro la aktuala diskutado pri manieroj esprimi kaj ne esprimi la sekson de persono en Esperanto, estas utile spuri la historion de tiu aspekto de la Esperanta morfologio kaj informiĝi pri la diversaj eksperimentoj kaj proponoj de d-ro Zamenhof tiurilate. La plej frua ekzemplo de Esperanto, datiĝanta de 1878 (*Lingwe Uniwersala* aŭ *Praesperanto* 1), estas la kvarlinia poemo **Malamikete de las nacjes**. Tiu tre mallonga teksto ne enhavas vorton kun finaĵo aŭ sufikso indikanta sekson, kaj la sola pronomo estas **so** «si». En 1881-1882 Zamenhof verkis kelkajn tekstojn en pli evoluigita formo de la Internacia Lingvo (*Praesperanto* 2). En tiu lingvo la maskla finaĵo de substantivoj estas «o», kaj la femala estas «aŭ»: **princo** «princo», **Princaŭ** «princino». Aliaj virinaj vortoj estas **filaŭ** «filino», **redzidaŭ** «regidino», **puettaŭ** «knabetino», **kosanaŭs**, «korteganinoj», kaj **amantaŭs** «amantinoj» (la finaĵo «s» indikas la pluralon).

Zamenhof mem ne pritraktis la etimologion de «aŭ», kaj mi povas prezenti nur hipotezon. Pluraj germanaj loknomoj (**Donaŭ**, **Landau**, **Zwickau**) kaj vortoj (**Bau**, **Frau**, **Gau**, **Schau**) finiĝas per la literoj «aŭ». Okulfrapa estas **Fraŭ** «virino». Zamenhof estus povinta akiri la finaĵon «aŭ», prenante la lastan parton de tiu germana vorto kune kun ties signifo. Li plej verŝajne sekvis la saman procedon, kiam plurajn jarojn poste li kreis la masklan sufikson «-ir», kiu konsistas el la lastaj du literoj de la latina vorto **vir** «viro». Tiu metodo formi morfe-mojn estas tre karakteriza de

Volapuko, la planlingvo de J.M. Schleyer, publikigita jardekon antaŭ Esperanto. Estas atestaĵoj, ke Zamenhof sufiĉe bone konis tiun lingvon. La finaĵo «aŭ» probable tre plaĉis al Zamenhof, ĉar en la klasika Esperanto de 1887, kies femala sufikso estas «-in», li ne forĵetis «aŭ» sed uzis ĝin kiel finaĵon de adverboj kaj prepozicioj kiel «hieraŭ», «apenaŭ», «antaŭ» kaj «laŭ». La pronomoj de Praesperanto 2, **ro** «li, ĝi, ŝo «ŝi», kaj **po** «ili», montras seksan diferencon nur en la tria persono de la singularo, same kiel en la definitiva Esperanto.

Ankaŭ la sufikso «-in» havas longan historion en Esperanto, ĉar ĝi aperas du fojojn en teksto de Praesperanto 2: **princino** kaj **filino**. Jen indiko, ke dum la tempo de frua lingva eksperimentado, Zamenhof ekhavis la ideon uzi ĝin kiel femalan sufikson, sekvatan de la substantiva finaĵo «o». Ĝi estas ĝenerale uzata en la germana lingvo por indiki femalon: **Nachbarin** «najbarino», **Eselin** «azenino». Apogo venas de inaj vortoj en aliaj lingvoj: latino **regina** «reĝino», helena **heroine** «heroino», rusa **knjaginja** «princino». Kelkfoje la sufikso «-in» estas uzata kun substantivoj, kiuj ne rilatas al personoj. Registritaj en *Plena Ilustrita Vortaro* estas «ŝraŭbino», «ion profunda truo en plato aŭ en metalpeco, provizita per helica kanalaĵo kaj akceptonta ŝraŭbon», kaj «jambino», «fami-liara nomo, por montri la jambajn versojn, post kies fina akcenta silabotroviĝas kroma, senakcenta». En la Esperanto de 1887 nur du pronomoj de la tria persono singulara montras sekson: «li» kaj «ŝi». En la reform-

projekto de 1894 la sola ŝanĝo estis en la formoj de la pronomoj: **lu** «li», **elu** «ŝi», **lu aŭ ho** «ĝi» kaj **ilu** «ili».

Ankoraŭ unu maniero indiki inecon estis proponita de Zamenhof: substantivoj de la virina sekso havu la finaĵon «a» anstataŭ la sufikso «-in» kaj la gramatika finaĵo «o»; ekzemple **patra** anstataŭ «patrino». En tiu kazo la adjektivo devas akiri alian formon. Zamenhof prikomentis tion en «Al la demando pri la reformoj» (**La Esperantisto**, n-ro 3, 1894) kaj rimarkigis, ke la virina «a» ekzistas en kelkaj etnolingvoj «kaj estus efektive pli oportuna ol «ino» dank'al sia pli granda natureco kaj mallongeco». Sed li mem pli frue en sia lingvokreada agado forĵetis tiun rimedon pro praktikaj kialoj. Malgraŭ tio, kiam estiĝis demandoj pri reformado de Esperanto en la fruaj 1890-aj jaroj, Zamenhof denove inklinis akcepti la «a» kiel finaĵon. Tamen, li denove substrekis, ke praktike la «a» ne estas tiel facile aplikebla kiel sugestita en la teoria diskuto, ĉar ĝi montriĝas nekonforma al la konstruo de la lingvo. La «a» ne povas servi kiel virina finaĵo, ĉar ĝia efiko perdiĝus en la pluformado de vortoj. Ekzemple, **frate** povas esti la adjektivo de **frato** aŭ **frata** «fratino», kaj **virigi** povas signifi **farigi viro** aŭ **farigi vira** «virina». Por konservi la formon **frata** estus necese starigi regulon, ke «a» estas ne defa-

lebla **finaĵo** sed nedefalebla **sufikso**, kiu diferencas de la aliaj sufiksoj, ĉar ĝi ne akceptas post si la substantivan finaĵon «o», ekzemple **fratae** «fratine», **virigi** «fariĝi virino». Kvantam kun iom da hezito, Zamenhof akceptis tiun solvon en sia reformprojekto, pensante, ke lernantoj ne trovos ĝin malfacila. Malgraŭ ĉio, praktikaj provoj konvinkis la aŭtoron de Esperanto, ke la virina «a» estas disonanca elemento en la Internacia Lingvo, do li decidis rifuzi ĝin kaj daŭrigi la uzon de la sufikso «-in», kiu jam pruvis sian utilon. Sed eĉ ĉe la fino de sia pritrakto, Zamenhof ankoraŭ lasis malfermita la pordon por ebla reakcepto de la virina «a», se esperantistoj insistas pri tio.

Ankoraŭ menciinda estas grupo da substantivoj, laŭdifine rilatantaj al virinoj, kiuj havas nek femalan finaĵon nek sufikson. Inter ili estas «megero» («ruza, malica virinaĉo»), «subreto» («servistino, ĉambristino en komedio»), «primadono» («unuaranga kantistino en opero») kaj «nimfo» («unu el la helenaj duondiinoj»). Laŭforme, do, ili ne distingiĝas de substantivoj rilatantaj al maskloj. Ĉu en Internacia Lingvo ne estas konsilinde doni ankaŭ al tiaj substantivoj markilon de ineco, aŭ ĉu ilia sensekca formo pli konformas al certaj feministaj tendencoj en la evoluiĝo de nia lingvo?

## GLUMARKOJ DE LA U. K. VANKUVERO



Okaze de la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto okazonta en Vankuvero, Brita Kolumbio, Kanado, estis eldonataj belaj memglueblaj markoj.

Libro-Servo de H.E.F. akiris kvanton, kiu nun havas je la dispono de ĉiu interesonto.

Prezo de ĉiu folio kun 35 memglueblaj markoj estas 200 p-toj plus sendokostoj.

Mendu ilin tuj al la kutima adreso de Libro-servo de H.E.F., Apartado 119 VALLADOLID.

---

## Rekomendoj al la kunlaborantoj de HEF-Redakcio

Kun la celo kunordigi la redaktadon de ĉiuj kunlaborantoj de HEF-Bulteno, jen estas indikitaj kelkaj rekomendoj:

1. Ne uzu romanajn ciferojn. Eble por vi XXIII estas numero tre klara, sed por la ne latinaj esperantistoj tio, estas stranga signo; tial do memoru ke en Esperanto oni devas uzi nur la arabajn ciferojn, ekzemple: 23.
2. La litero Ŭ - ŭ estas netuŝebla, do ne skribu literojn Ŭ - ŭ aŭ Ŭ - ŭ aŭ Ŭ - ŭ aŭ Ŭ - ŭ.
3. Kiam vi skribas ordajn ciferojn ne skribu 42.<sup>o</sup> faru: 42-a aŭ 42a.
4. Uzu la vorton **celebri** nur pri religiaj aferoj kaj festoj. En aliaj temoj uzu la vortojn: Organizati, festi, okazigi, soleni, ktp.
5. Memoru ke la vorto **Asembleo** ne estas samsignifa kiel: kunsido aŭ kunveno. Asambleo estas propra nomo de leĝofaranta organizaĵo, ekz: Tiu de UNESKO, pro tio ĝia unua litero estas majuskla.
6. Kiam vi mallongigos vorton, uzu la uzatajn mallongigojn kaj simbolojn aperintaj en P.I.V., ekzemple: (s-ro), (inĝ.), (d-ro), (n-ro), (sekr.), (str.), (bv.), kaj ne kreu novajn.
7. Ne uzu la prefikson (GE) kaj la sufikson (INO) kun la vortoj: bebo, infano, homo, persono, individuo, pupo, marioneto.
8. Pri la horaro ne uzu la ciferon (11<sup>1</sup>/<sub>2</sub>) estas pli klare 11,30 aŭ 11 h. 30.
9. En la mallongigoj: d-ro, s-ano, s-ro, prof. kaj aliaj, oni devas skribi majuskle la unuan literon nur komence de skribaĵoj aŭ post punkto. Ekzemple: S-ro Jozefo dum la kunveno kun s-ro Petro kaj d-ro Frederiko parolis pri...

*Salvador Aragay*  
Ĉefredaktoro de «BOLETIN»

---

## NOTAS DE INTERES PARA TODOS LOS FEDERADOS

**TARJETA DE SOCIO.**—Todo miembro de la Federación, al corriente del pago de la cuota, debe poseer la citada tarjeta. Si alguno, por alguna circunstancia no la hubiese recibido o habiéndola recibido la ha extraviado, no dude en solicitarla.

**DIRECTORIO.**—En el año 1982 se editó el Directorio de la Federación en la que figuran las direcciones por Provincias de todos los miembros pertene-

cientes a la misma en el citado año. Las modificaciones posteriores se han publicado en distintos números de BOLETIN. Las personas que, habiéndose inscrito en la Federación, no lo posean pueden solicitar un ejemplar a la Secretaría de la Federación Española de Esperanto.

**HOJA INFORMATIVA.**—Adjunto se envía un ejemplar de la hoja informativa editada por la Federación Española de Esperanto, en cuya parte final va un recuadro en blanco para que en el mismo se ponga la dirección que se estime conveniente.

Si algún socio desea recibir más ejemplares, puede solicitarlos, enviando 100 pts. en sellos de correos y recibirá 50 ejemplares.

---

## MODIFICACIONES AL DIRECTORIO

### ALTAS

ALCOY (Alicante)	2.174	Asensi Cortés, Antulio; Joaquín Sorolla, 6 10-a.
	2.713	Lucas Albors, Amadeo; Alfonso el Magnánimo, 5.
	2.715	Martínez Morales, Ismael; Alicante, 26, 2º
	2.712	Verdú Gisbert, Evaristo; San Vicente, 37
GIJON (Asturias)	2.717	Elez-Villarroel, Antonio; Magnus Blikstad, 45.
SALAMANCA	2.716	Martín Conde, Juan José; Crta. Ledesma, 137, 2º C
ZARAGOZA	2.178	Sanz Asensio, Eugenio, Lorente 19, 1º D; d. p. 5.

### BAJAS

BARCELONA	229	Grupo de Esperanto «Stelo de Paco»
-----------	-----	------------------------------------

### CAMBIOS DE DOMICILIO

ALMANSA (Albacete)	2.062	Fuentes Blas, Florentino; Mendizábal, 65 (Se traslada de TERESA DE COFRENTES (Valencia).
PALMA DE MALLORCA	395	Costa Bonet, Antonio; Bolero, 18, 2º 2.º. (Se traslada de San Mateo Ibiza)
JIMENA DE LA FRONTERA (Cádiz)	2.667	Martín, Leslie A; José Antonio, 7.
HUESA (Jaén)	2.665	Uceda Flores, Antonio; N. Segura, 17.

---

# FUNDACION «ESPERANTO» Internacia Literatura Konkurso

## VERDIKTO

La 10-an de decembro 1983-a kunsidis la membroj de la Patronaro Prof. D-ro Miguel Sancho Izquierdo, S-ro Víctor Ortiz, kaj F-ino Inés Gastón, sekretariino. Ŝi informis pri la poentoj asignitaj de ĉiu membro de la Juĝkomisio, respektive S-ro Salvador Guma (Reus, Hisp.), S-ro Miguel Gutiérrez (Santander, Hisp.), S-ro Petro Nuez (Barcelona, Hisp.), kaj D-ro José Olavide (Zaragoza, Hisp.).

La adicio de la poentoj respektivaj rezultigis:  
30 poentojn al la konkursaĵo «Oscar kaj la mevo», subskribita de **Aralar**, al kiu estas aljuĝita la

Premio: «Juan Miguel Piquero», kaj

29 poentojn al la konkursaĵo «Kiel ĉiuj katetoj», subskribita de **Nodeto**, al kiu estas aljuĝita la

Subpremio: «Juan Miguel Piquero».

Tuj poste la sekretariino malfermis la identigajn kovertojn, kaj la aŭtoroj premiitaj estas:

Ana María RANERO Aralar (Salamanca, Hisp.): Premio «Juan Miguel Piquero».

Agnieszka USAKIEWICZ Nodeto (Warszawa, PL.): Subpremio «Juan Miguel Piquero».

La Patronaro de «Fundación Esperanto» dankas al la Juĝintoj pro ilia kunlaboro, kaj al la partoprenintoj pro ilia entuziasma klopodo vivigi Esperanton per siaj verkoj.

Zaragoza (Hispanujo), la 15-an de decembro 1983-a.

*Inés Gastón*  
Sekretariino de «Fundación Esperanto»  
kaj de la Konkurso

---

## NOTO

Redaktoro de «JUNA AMIKO» bonvenigas kompetentajn tradukojn de la plej belaj nacilingvaj porinfanaj poemoj en Esperanto de klasikaj kaj modernaj aŭtoroj. Konvenaj estas ankaŭ la jam ekzistantaj tradukoj.

Bv. sendi kune kun la originala teksto kaj en du ekzempleroj al: S-ro Oldřich Knichal, Budaörs, Patkó u.3.II.19, 2.040 Hungario.

---



# Internaciaj Kongresoj kaj Kunvenoj

**40-a Internacia Junulara Kongreso** okazonta en SWANWICK (Britio) de la 13-a ĝis la 20-a de Julio de 1984-a. Temo de la kongreso estos: «**Homo kaj maŝino**». Prelegoj, diskutoj kaj laborgrupoj traktos la diversajn aspektojn de ĉi tiu temo, sed kiel kutime dum IJK abundos ankaŭ la pure distraj elementoj en la programo. Laŭtradicie, interkona kaj adiaŭa vesperoj komencos kaj finos la nunjaran IJK-on, inter ili okazos vespero de popoldanco kaj populmuziko; brita kaj internacia vesperoj; balo, tuttaga ekskurso kaj teatra vespero. En la kadro de la Kongreso la Junularo Esperantista Brita festos la 25 jardatreveno de ĝia fondiĝo.

Pliajn informojn kaj aliĝilojn petu al: 40-a Internacia Junulara Kongreso; Esperanto-Centro; 140 Holland Park Avenue, LONDON, Brito W11 4UF.

\* \* \*

## **Kulturaj Aranĝoj 1984-a en la Esperantista Kulturdomo de Gresillon.**

1. De la 1-a ĝis la 22-a de Julio, **seminario pri rekta metodo de instruado de Esperanto** kun diversstemaj prelegoj, kursoj diversnivelaĵoj por internacia ĉeestantaro, konversacioj, malkovro de la regiono. Fine de tiu periodo, okazos la 21-an kaj 22-an de Julio, matene, la **Tria Lojra Esperanto-Rendevuo**.

2. De la 22-a de Julio ĝis la 5-a de Aŭgusto, kursoj trinivelaĵoj por internacia ĉeestantaro; artlaboroj, malkovro de la regiono.

3. De la 5-a ĝis la 19-a de Aŭgusto **Esperanto per Slojdo** proponas: Elementan kaj Progresigan Kursojn por la praktikado de fotoarto, ceramiko, ŝtofmozaiko, kartonprilaborado...: kurson pri la praktiko de la Esperanto-strukturoj; viziton de la regiono kaj de artmetiejoj.

4. **Renkonto de Blindaj kaj Neblindaj Esperantistoj** okazonta de la 19-a de Aŭgusto ĝis la 2-a de Septembro. Oni antaŭvidas kulturen programon, kursojn kaj diversajn distraĵojn.

Pliajn informojn petu al: Esperanto-Domo: Gresillon, 49.150 BAUGE (Francio).

\* \* \*

**Unua Mediteranea Konferenco de Esperantologio**, organizata de Kooperativo de Literatura Foiro, kunlabore kun la Muzeo de Esperanto (Sant Pau d'Ordal) honore al la deka datreveno de la institucio.

La ĉeftemo estas: «**Leksikografiaj aspektoj de Esperanto**» kaj ĝi okazigos en la Hotelo Pere III de Vilafranca del Penedés (Barcelona) de la 31-a de Majo ĝis la 3-a de Junio.

La Provizora Programo antaŭvidas: Interkonan Vesperon; Prelegojn, Ekskurson; Laborkunsidojn; Oficialan Akcepton en la Muzeo de Esperanto; k.t.p.

La Konferenco estas malfermita al ĉiuj kaj la kotizo, kiu estas 2.000 p-toj inkluzivas la partoprenon en la laborgrupoj, la akcepton en la Muzeo kaj la ekskurson. Ekzistas simbola aliĝo po 500 p-toj.

Pli detalajn informojn petu rekte al: S-ro Luis M. Hernández Yzal; Apartado, 83; VILAFRANCA DEL PENEDES (Hispanio).

# NIAJ GRUPOJ

**BARCELONA.**—En la sidejo de Barcelona Esperanto-Centro kaj Llibreria Esperanto okazis la oficiala prezentado en Katalunio de la libro pri sciencfikcio kaj fantasto, titolita «SFEROJ-2».

La libro estis prezentita de ĝia kompilinto s-ro Miguel Gutiérrez Adúriz, kaj ĝi estas aĉetebla en ĉiu E-librovendejo, inter ili Libreria Esperanto kaj Libro-Servo de H.E.F.

Okaze de la Solena Festo organizita en nia Centro la pasintan 4-an de Decembro, oni anoncis la verdikton de la Internacia Literatura Konkurso «Ramón Molera». La unua Premio estis ne aljuĝita kaj la dua premio ricevis s-ro Robert Lloancy el Francio pro «Ĉu estas limoj en la delegiteco?».



Maldekstre, s-ro F. Alberich, Vicprezidanto de B.E.C. kaj dekstre, s-ro Miguel Gutiérrez.

**ZARAGOZA.**—Post preskaŭ duonjarcenta silento reaperis «NIA VIVO» bulteno de la Esperanta Societo «FRATECO». La unua numero de ĉiu-tiu dua epoko estas varia kaj interesa Ni deziras al la reaperinta revuo longan kaj sukcesan vivon.

**CALLOSA DE SEGURA.**—Por inde festi la 50-an datrevenon de la fondiĝo de la loka Esperanto-Grupo «ĈIAM ESPERANTO» kaj la «TAGO DE ZAMENHOF» estis aranĝita en ĉiu-tiu ĉarma urbeto, tre varia kaj alloga programo.

**GIJON.**—La aktiva anaro de la Astura E-Asocio inde omaĝis al d-ro Zamenhof, kreinto de Esperanto, per varia programo okazinta la 18-an de Decembro.

Unue, oni metis florbukedojn en la du nomtabuloj de la strato Esperanto kaj sekve en la Teatro de la Universitata Katedro «JOVELLANOS» okazis la ĉefa programero.

Post la bonvenigaj salutvortoj de la Prezidanto de la Asocio, s-ro Mulas, prelegis hispanlingve pri la temo «Esperanto, ĉu utopio aŭ socia neceso?», la Prezidantino de Hispana Federacio, d-rino Maria Rafaela Urueña. La ĉeestantaro, per fortaj aplaŭdoj, premiis la interesan prelegon de nia Prezidantino. Sekve, la juna Javier Suárez Quirós ludis per elektra organo diversajn komponaĵojn, finante per la ludo de la esperantista himno «la Espero». Brila broĉo al ĉi tiu aranĝo estis la interveno de la Asturia Koralo de La Calzada kiu regalis nin per tre varia kaj interesa repertuaro.

Bankedo en centra restoracio, en kiu regis gajan etoson, metis finan punkton al la nunjara programo  
**ĈEESTANTO**

**VALLADOLID.**—La datreveno de la naskiĝo de d-ro L.L. Zamenhof estis festata de la loka E-Grupo «FIDO KAJ ESPERO» per la jena programo: Esperantlingvaj prelegoj pri «Nuntempaj Problemoj» kaj «La Naskiĝo de la Tabako» fare de d-ro Antonio Gil Contreras kaj s-ro Angel Díez; Meso en Esperanto celebrata de pastro Jonás Castro kaj bankedo en popola restoracio de la urbo.

**MADRID.**—La ĉefaj celoj de la Madrida Esperanto-Liceo estas informi vastkale la publikon pri la Internacia Lingvo, instrui ĝin al kiel eble



De maldekstre: Augusto Casquero, Gian-Carlo Figliera; Marton Lengyel (Hungario) kaj Juan Carlos Ruiz dum la merkredaj konversaciaj rondoj (Foto A.F.S.).

plej multaj personoj kaj aranĝi kunvenojn por praktiki la lingvon.

En oktobro komenciĝis novaj kursoj: elementaj okazas ĉiutage vespere (sabate antaŭtagmeze) kaj perfektigaj trifoje semajne (19-20 h.). Apartajn «trinkejajn konversaciojn» gvidas ĉiuvendrede s-ano Miguel Fernández.

Ĉiumerkrede okazas speciala programo, kiu celas paroligi la membrojn kaj plialtigi la ĝeneralan lingvonivelon. En tiu kadro, krom «Konversaciaj vesperoj», unufoje monate oni aranĝas kulturan prelegon aŭ filmon, komunajn manĝetojn, k.s.

## HISPANA LIRIKO

### Omaĝe al la bela Sevilla, nia proksima kongresurbo

#### SEVILJANA KAPRICO

La strateto estas vundo  
per kalko kaj lumo kuracita.  
Ludas kun rozujo la suno  
en fenestro florvestita.  
Invitas al preĝo la siesto,

l'akvo preĝante eterniĝas,  
surprize en la silenta korto  
la rozon timigis krio subita,  
kaj sur la kristalpura fonto,  
la rozo dorlote kliniĝas...

F. VILLALON

Tradukis: Antonio Marco Botella

FERNANDO VILLALON naskiĝis en la jaro 1881-a, en la propra urbo Sevilla. Kiel poeto, elstara kaj sentema, li sciis majstre kanti la belecon kaj pitoreskecon de sia tero, kaj enprofundiĝis en la andaluzajn temojn kaj folkorajn motivojn.

Komence, li estis forte influita de la tiama gongorismo, stilo reganta dum lia unua epoko de poeto, sed iom post iom li evoluis al plej modernecaj kaj avangardaj kriterioj, kies rezulto estas poezio malpli efekta kaj brilkolora, esprimo pli intima kaj delikata, kaj stilo pli rafinita kaj propra. Li estis intime ligita al la tiel nomata «generacio 1927-a» kun kiuj li tre ofte kontaktis kaj sin sentis identigita.

Li publikigis plurajn verkojn, el kiuj ni substrekas kiel plejn gravajn: «La Malsupra Andaluzio» kaj «Romancoj de la 19-a jarcento».

Li forpasis en Madrido, en la jaro 1930-a, fariĝinte grava poeto en sia elstara generacio de grandaj poetoj.

# INFORMO

---

Ĝus aperis en nia esperanta kulturo —ĝi fondiĝis dum la U. K. en Budapeŝto—, nova organizo kies estonteco ŝajnas fruktodona, precipe pro ĝia seriozeco kaj la kvalito de la revuo kiun ĝi eldonas. Temas pri Filozofia Asocio Tutmonda, esperanta asocio celanta la intelektan kunligon de ĉiulandaj filozofoj per Esperanto. La prezidanto estas E. Pauli, ankaŭ eldonanto de Fonto. Membrigi en ĝia estraro aliaj gravaj esperantistoj kiel E. de Zilah, profesoro pri filozofio en la universitato de Metz (Francio) kaj A. Goodheir, akademiano kaj tradukinto de la «Apologio de Sokrato» kaj «Kritono» de Platono.

Sendepende organizita sed samcele ligita al FAT, aperis la revuo SIMPOZIO kies du unuaj numeroj elsendiĝis ĉi-jare 1983-a. La unua prezentis la FAT-intencaron kaj enhavis diversajn altkvalitajn artikolojn pri Parmenido, Spinozo, Kartezio, k.t.p... la dua numero miaopinie superis la unuan. Ĝi omaĝe dediĉiĝis al K. Jasperso pro ilia centjara naskiĝa datreveno. Estas malfacile elekti la plej bonan artikolon ĉar ĉiuj meritas legadon. Tamen mi deziras prientigi tiun de A. Goodheir pri Boecio.

La revuo komencis gravan projekton: la verkadon de esperant-lingva filozofia vortaro (aŭtoroj kaj terminoj). Laŭ mi tiu ĉi penado meritas zorgon kaj apogon de la tuta Esperanto-movado.

Se vi interesiĝas pri la afero bv. turniĝi al E. Pauli, Rua Cons. Mafra, 176; BR 88.000 FLORIANOPOLIS SC, Brazilo; aŭ al mi mem, delegito de la asocio en Hispanio: M. A. Sancho; str. Marcelo Usera, 163; MADRIDO-26.

M. A. SANCHO

---

## 44-a Hispana Esperanto-Kongreso

### Loka Kongresa Komitato

Honora Prezidanto	Moŝta s-ro Rafael Fiol Paredes
Prezidanto	S-ro Manuel Ramírez Cepeda
Vicprezidanto	S-ro Victoriano Márquez de la Vega
Sekretario	S-ro José Pavón Arreiciado
Vicsekretario	S-ro Alberto Franco Ramírez
Kasisto	S-ro Tomás Caspe Cereijo
Voĉdonanto (Junularaj Aferoj)	S-ro Antonio Rodríguez Gasch
Voĉdonanto (Informado)	S-ro Rodrigo Vaquera Márquez
Voĉdonanto (Gastigado)	S-ro José Cintas Vaquero
Voĉdonanto (Publikaj Rilatoj)	S-ro Felipe González del Pino
Voĉdonanto (Kulturo kaj Sporto)	S-ro Juan de Dios Montoto Sarriá

---

---

# RECENZOJ, RECENZOJ, RECENZOJ

---

## LA LINGVA ESENCO DE ESPERANTO

Aŭtoro: Atanas D. Atanasov. Eldonas: U.E.A. 176 paĝoj. Mendebila ĉe Libro-servo de H.E.F. Prezo 1.544 P-toj.

Eldonite de U.E.A. en 1983-a aperas nova interesa libro post la forpaso de la aŭtoro, Atanas D. Atanasov (1892-1981-a) estinta Vicprezidanto de la Akademio de Esperanto kaj elstara esperantologo. Li estis konata ankaŭ per la plumnomo ADA. Sur la literatura kampo li multe okupiĝis pri tradukado el sia gepatra lingvo, la bulgara kaj li estis konata lingvisto enirinta la Akademion de Esperanto en 1964-a.

La libro enhavas 23 esperantologiajn eseojn i. a. pri fonetiko, vortfarado, sinonimoj kaj homonimoj, la arto traduki, onomatopeoj, la pasivaj participoj, neologismoj, k.t.p.

La tuto estas tre interesa, ĉefe por eviti kelkajn erarojn en la konstruo de la frazoj, kun speciala atentigo pri la uzo de prepozicioj, de la esprimoj, **tiel-kiel**, **kiel-tiel**, la loko de **ne** en propozicio, kaj alia ĉapitro dediĉita al la propraj esprimovoj de Esperanto.

Menciinda estas ankaŭ la ĉapitro pri «Interlingvistiko» kaj «la utiligo de Esperanto por filologiaj studoj», tiu-ĉi lasta ĉerpita el la prelego farita dum la 48-a U. K. de Esperanto en Sofio en 1963-a.

Resume, bona libro, presita sur luksa papero, kun eleganta kovrilo el plastumita kartono, nepre uzenda por tiuj kiuj deziras perfektigi sian scion pri Esperanto kaj la ĝustan uzadon de la lingvo, **pensante ĉiam en Esperanto**.

Ni gratulas la gvidantojn de U.E.A. pro ilia deziro vigligi kaj evoluigi ĝian eldonadon.

M. R. U.

## PALMSTROJMO

Aŭtoro: Christian Morgenstern; tradukis: Rikardo Ŝulco; eldonis: Esperanto-Centro, Paderborn, 1983. 181 Paĝoj. 19 x 11,5 cm. Preso kaj bindo tre bonaj.

Lastatempe, niaj tradukistoj sin dediĉis elekti tekstojn laŭ sia persona —tre respektinda— inklino, sen objektiva konsidero al la nuntempa valorigo de tiaj verkoj en la kampo de la naciaj aŭ universala literaturoj. Signifaj ekzemploj: Mimó, Goodheir, kaj nun Richard Schulz = Rikardo Ŝulco.

Ŝulco prezentas tradukon de la verko «Palmström», de la germana poeto Christian Morgenstern. Morgenstern (1871-1914), tradukis germanen tekstojn de Ibsen, Strindberg kaj Hamsun kaj verkis poezion fantast-groteskan. Certagrade, oni povas lin konsideri kiel pioniron de subrealismo. Li ne multe konatiĝis for de sia lando.

«Palmström» —«Palmstrojmo» en la traduko de Ŝulco— estas kolekto de versaĵoj, aludantaj difinitajn aspektojn de la kultura vivo en Germanio je la komenco de la nuna jarcento. Ĝi baziĝas sur metafizika kaj amara humoro kaj rimarkindas en ĝi la profunda esplorado de la aŭtoro pri la eblecoj de la lingvo.

Publikigitaj en 1910-a, tiuj versoj aperas sensignifaj, krom por kulturitaj germanoj, kaj ili troviĝas ekster tempo kaj loko por la plejmulto de la esperantistaj legantoj.

Sendube R. Ŝulco bone konsciis pri tiu punkto, ĉar li ne nur tradukis la versojn, sed ankaŭ aldonis glosojn, komentariojn kaj proprajn versojn, kaj tio havas la efikon revivigi

la velkiĝintan originalon kaj prezenti ĝin en freŝa perspektivo, kie la leganto povas kapti la intencon de la aŭtoro.

Do, pri la esperanta versio, eĉ ne konante la originalon, mi diru ke la laboro de s-ro Ŝulco estas vere majstra. Esperanto semantike riĉa kaj sulka, sintakso aŭdaca kaj eleganta, montras ĝis kia grado Ŝulco majstras la lingvon, samkiel refoje la kapablon de esperanto fidele speguli la penson kaj stilon de la verkisto.

La tuta libro abundas je propraj kaj geografiaj nomoj esperantigitaj laŭ la persona sistemo de s-ro Ŝulco (Schulz). Sistemo, kiun Dratwer nomis «manio» kaj Solzbacher «absurdaĵo». Ne demandite, mi silentas.

J E S

---

## SEPTEMBRO ESTIĜOS MAJO

---

Antologio de bulgarlingvaj kaj esperantlingvaj poeziaĵoj kaj prozaĵoj, pri «La Septembra Ribelo 1923». Tradukis: diversaj aŭtoroj. Kompilis Nano Kjuĉokov, 197 paĝoj, 120 x 190 cm.

El Sofio venis libro, modesta laŭ la aspekto, sed riĉa laŭ iuj trajtoj beletraj. Ĝi estas bona antologia kompilaĵo konsistanta el tekstoj prozaj kaj poeziaj, temantaj nur pri la tiel nomata «Septembra Ribelo de la jaro 1923-a». Do, la libro proponas al la eblaj legantoj enprofundiĝi en historiajn fakton kiuj, prave-neprave, estas prezentitaj laŭ prismo klare partiuma —ĉar ĉiu revolucio balanciĝas super supraĵoj de subjektivecaj rezonadoj kaj intereso. Jen, do, libro pri bulgara revolucia poezio, kium laŭ la kompilinto Nano Kjuĉokov kaj la enkondukantoj Georgi Dimitrov kaj Todor Ĵivkov, reprezentas preskaŭ profetaĵan mesaĝon kiu elpravigis la postajn signojn kaj faktojn de la «Granda Oktobra Socialisma Revolucio».

Antaŭ tio, ĉu oni riskas perfidi sian neŭtralecon recenzante verkon kiu, tute senmaske, hisas standardon de unupartiaj revoluciaj idealoj?

Ĉar mi ne kapablas dedukti la veraĵon aŭ la neveraĵon rilate asertojn kaj preskaŭ dogmajn kialojn —mi nek farus tion—, mi konsideras ke, tamen, povas esti utila la laboro recenzi tiun, aŭ alian similan, libron, nur laŭ la flanko specife literatura.

Pri tiu aspekto, mi povas diri tute libere, ke la libro tuj pikis mian atenton; kaj ke mi plene ĝuadis, ĉar Esperanto estas tre kontentige kaj digne uzita en ĝi. Kompreneble mi ne scipovas la bulgaran, sed ŝajnas al mi ke la tradukaĵoj laŭiras glite, ĉar ĉiu poemo kaj rakonto (re) donas konkretan etoson: «Dronigitoj», «Septembro», «Trans granitaj la bariloj», «Nostalgio», «La lasta batalo ĉe Bojĉinovci», «Balado pri tri fratinoj», «La mortpafo», «Krioj de la sklavo», kc.

La lingvo, en la poemoj, estas uzita kun saĝo kaj per rimedoj tute fundamentaj, sen trouzo de neologismoj. Tial, oni facile ekkaptas la sencon kaj celon de ĉiu poemo, kaj, des pli, ĉar la sintakso ne stumblas nek fariĝas implikaĵoj.

La prozaj tekstoj, kiuj pli-malpli ampleksas la duonon de la libro, laŭiras saman vojon de indeco beletra. Ili estas bone prilaboritaj, kaj ĝenerale, aspektas kiel verkoj originale verkitaj en Esperanto, malgraŭ etaj perfidaĵoj.

Preseraroj ne multe abundas, sed ekaperas nepensite. Malpli ol la preseraroj, troviĝas la gramatikaj.

Je la finaj paĝoj ni povas legi biografieton kaj bibliografion pri ĉiu aŭtoro.

Kelkaj versaĵoj, de Dimitri Zlatarski, Asen Grigorov kaj Hristo Gorov, estas originale verkitaj en Esperanto.

Resume: libro el kiu iuj volos profiti nur beletristikan flankon, kiu, tamen, estas bona. Ĝin redaktis Lidija Raeva.

G. MORA i ARANA

# DEZIRAS KORESPONDI

---

Pri instruado de Esperanto al infanoj 10-14 jaraj, instruisto en mezlernejo. Skola NGI, KID (Esperanto); 2, Krasnodarskaja 82; **ROSTOV-DON-91**, Sovetunio. Ankaŭ, volonte, akceptas kolektivian korespondadon por la infanoj de la kurso.

Kun hispanaj kaj eksterlandaj samideanoj pri diversaj temoj kaj interŝanĝo de b.k. kaj p.m. kaj diskojn de mondfamaj furor-grupoj kaj magazinoj; 32 jaraĝa ĉeka arkitekto. S-ro Inĝ Miroslav Čaha; Perečinska, 1; 06601 **HUMENNE** (Ĉekoslovakio).

Kun lernanto aŭ lernantino 14 18 jaraĝa pri diversaj temoj, Ōze Erzsébet **SZENTES**; Jókai u. 168; 6600 **HUNGARIO**.

Kun 11-13 jaraj junuloj, F-ino Barbara Hajas, **SZOMBATHELY**, Barátság u. 15 I 16; 9.700 **HUNGARIO**.

26 jaraĝa studentino, sciante la lingvojn francan, rusan, germanan kaj esperantan, pri filozofio, pedagogio kaj psikologio kun hispana samideano. F-ino Klara Katona; **BUDAPEST**, Nèmetvölgyi ust 57/59; H-1124 **HUNGARIO**.

Pri filmo, muziko, futbalo, k.t.p. 30 jaraĝa. S-ro Eugeni Ivanov Eutimov; ul. Todor Milanoviĉ, 17; BG-5.250 **SVISTOV** (Bulgario).

Pri modo, ĵurnaloj, kaj interŝanĝo de b.k. kaj p.m. I. Leĉko, Gwerkovej 6, 854 01 **BRATISLAVA** (Ĉekoslovakio).

Por interŝanĝo de b.k. kaj p.m. 25 jaraĝa F-ino Hanna Libera; ul. Iariskiego, 5 m B; 02150 **VARSOVIO** (Pollando).

Kun hispanaj samideanoj S-ro Petro Adolp, Str: Armii W. Polskiego 34/10 **84-100 PWCK** (Pollando).

Por interŝanĝo de b.k. kaj p. m. 35 jaraĝa; Milan Nosek; Trida Kosmonawtwo 1.080; **MLADA BOLESLAV** (Ĉekoslovakio).

Kun hispanaj gejunuloj, S-ino Balogh Viktoria; H-3.300 **EGER**; Zalka Maté u 40 (Hungario).

Kun hispanaj samideanoj, 25 jaraĝa librovendistino por interŝanĝo de libroj, bildoj, gramofondiskoj, k.t.p. S-ino Emilia Apostolova Koleva; Zahari Stojanov, 70; 7.230 **ASSENOVGRAD** (Bulgario).

# 44-a Hispana Kongreso de Esperanto

Okazonta en Sevilla de la 7-a ĝis la 12-a de Julio 1984-a  
Temo: «Turismo, ĉu socia fenomeno?»  
Kongresejo: Instituto Velázquez

## PROVIZORA PROGRAMO

- Vendredon 7-an.** Disdonado de dokumentoj  
Vizito al la Alkazar
- Sabaton 8-an.** Kunveno de H.E.F-estraro kun delegitoj de Grupoj kaj Sekcioj  
Solena Inaŭguro  
Oficiala foto  
Ekzamenoj  
Seminario pri Turismo  
Junulara Vespero  
Ŝipa Promenado
- Dimanĉon 9-an.** Kunveno de redaktoroj de E-revuoj kaj gazetoj  
Fakaj Kunvenoj  
Ekskurso
- Lundon 10-an** Ĝenerala Kunveno de H.E.F.  
Prelego  
Omaĝo al la Veteranoj  
Folkloro Presentado
- Mardon 11-an.** Duontaga vizito tra la urbo.  
Laborkunsido de Hispana Jubilea Komisiono  
Oficiala prezento de nova verko  
Prelego  
Solena Fermo  
Bankedo
- Merkredon 12-an.** Tuttaga postkongresa ekskurso.

---

## 8-a H.E.J.S-TENDARO

En la bela urbo **KORDOVO**, okazos de la 20-a ĝis la 23-a de Aprilo la nunjara H.E.J.S.-Tendaro, kie oni traktos la temon: «**Esperanto kiel alternativo**».

En la kadro de la programo oni festos la 25-an Jubileon de la fondiĝo de la Junulara Sekcio de la Hispana Esperanto-Federacio.

Pli detalajn informojn kaj aliĝilojn petu al H.E.J.S. Atocha, 98, 4º MADRID-12.

---